

Unua Forumo de ILEI-gvidantoj

2021-02-06

16-a ĝis 17-a horo 30

Partoprenis 26 personoj.

Unue ĉiu prezentis sin mallonge, dirante nur la nomon kaj la loĝlandon.

Due venis diskuto pri teritori-bazaj Sekcioj de ILEI (kontraste kun land-bazaj Asocioj de UEA), kaj ni traktis la situacion de Katalunio/Hispanio, Kristin Tytgat parolis pri la situacio en Belgio, kaj Reza Kheirhah pri tio en Tajvano. Konstato: neeviteble la politiko invitas sin en nian laboron.

Laura Brazzabeni parolis pri naciaj ekzamenoj, kiuj nun estas en la manoj de strukturo nomita Itala Eo-Instituto. Laŭ tio ebla temo de iu venonta Forumo povus esti **NACIAJ EKZAMENOJ**.

Pro la alta kosto de kotizoj ni aŭdis la ideon, ke naskiĝu **ILEI-AMIKARO** kun nura simbola kotizo, aŭ eĉ tute senpaga por ne(trans)pagivaj landoj.

Reza Kheirhah parolis pri sia nova – kaj unuafoje oficiale elektebla – Eo-kurso en ŝtata universitato de Kaoshung. Mirejo substrekis la gravecon de registrado de ĉiu Eo-kurso ĉe www.edukado.net. Reza petis konsilojn pri enhavo de la instruado, adekvata instrulibro, metodiko... Laŭ tio ebla temo de futura Forumo povus esti **KION INSTRUI AL UNIVERSITATAJ GESTUDENTOJ? (enhavo de la kursoj de/pri E-o)**

Ekzistas projekto lanĉita kaj prizorgata de Vincente Manzano Arrondo (Viko) titolita IKIKO, mallongigo por la «Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado»; laŭ tio ebla temo de alia Forumo povus esti **INTERKULTURA EDUKADO**.

Oni proponis **la neceson por revoki la membrojn, kiuj malaperis en la lastaj jaroj, por remembrigi ilin**.

La tri membroj de la Elekta Komisiono partoprenis la Forumon. Mirejo donis la parolvicon al ties prezidanto Aurora Bute. Aurora deziras vastan informadon pri la **elektoj**. Mirejo proponis, ke tio estu **la temo de nia venonta Forumo**. Multaj subtenis. Do Mirejo donas prioritaton al tiu temo, kiu estos traktata la 6-an de marto post vastskala diskonigado.

ooOOOOOoo